

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Syyskuu ♦ Septembro

4/1997



Suomen esperantoliiton ja Helsingin esperantoseuran uusi toimisto sijaitsee katutasossa lähellä Kallion kirkkoa.

Pasintomeraj aranĝoj, p. 6-9
Atilio Orellana Rojas, p. 10-11
Joel Vilkki, p. 12-13
Esperantouutisia, s. 14-15

Tiu ĉi numero aperos ankaŭ en Interreto: <http://www.sci.fi/matlah/ea/>

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ aorantan@jylk.jyu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@icl.fi

WWW-sivujen taitto/ Enpaĝigo de TTT-paĝoj: *Matti Lahtinen* (osoite alla/ adreso sube).

Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Pengerkatu 18 A 86, 00500 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Terrassgatan 18 A 86, 00500 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 600

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ tijupie@uta.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; työ/laboro: (03) 249 4313

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 3, 20350 Turku. ☎ (02) 238 7767

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Matti Lahtinen, Syrjälänkatu 6 B 61, 40700 Jyväskylä. ☎ (014) 615 054 ✉ matlah@sci.fi

Tuula Virolainen, Auringonkatu 8 E 48, 02210 Espoo. ☎ (09) 803 6149 ✉ tuula.virolainen@vtt.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Sylvia Hämäläinen, Teivaalantie 85, 33400 Tampere. ☎ (03) 346 3493

Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raita.pyhala@lesti.kpnet.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo.

☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaja/aŭtomata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä* (osoite yllä/ adreso supre),

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Esperanto mukana suuressa kielivaltapelissä

Umberto Eco pohtii kirjassaan ”La sercêdo de la perfekta lingvo” esperanton mahdollisuuksia lyödä itsensä läpi. Parhaiten se kävisi taloudellisesti ja poliittisesti tärkeiden kansakuntien toisiaan kohtaan tuntemaa kateutta hyväksikäyttäen. Välttääkseen toisen suurvallan kielien ottamista lingua francaksi, yleiseksi työkieleksi, suurvallat voisivat valita kompromissina esperanton, jotta yksikään suurvallta ei voisi asettua toisten yläpuolelle, hegemonia-asemaan. Umberto Eco näkee esperanton mahdollisuudet suuremmiksi Euroopan Yhteisössä kuin maailmanlaajuisesti. YK:lla ja sen tytäjärjestöillä on vain suositusvalta, kun taas Euroopan yhteisön päättävillä elimillä on päätösvalta kielivalinnoissa. Myös UEA:n keskustuomiston johtajan Osmo Bullerin mielestä Euroopassa on aukenemassa uusia näkökulmia esperantolle (haastattelu Kansan Uutisissa 29.7.97).

Maailmanlaajuisesti englannin ylivoimaa on vaikea torjua. Ainoastaan Kiinan

kansantasavallan hallitus on uskaltanut lopettaa lehdistökonferenssiensa kääntämisen englanniksi. Perusteluissaan Kiinan hallitus sanoi, että lehdistökonferenssien kielenä tulee olemaan kiina, kunnes neutraali yleinen maailmankieli otetaan käyttöön. Euroopan Unionin alueella tilanne on toinen. Täällä vallitsee tämän jutun alkupuolella siteeratun Umberto Econ ajatuksen mukainen tilanne. Englanti, Ranska ja Saksa ovat melko tasaväkisessä taistelussa keskenään myös kansallisten kieltensä puolesta. Tätä kilpailutilannetta voidaan käyttää esperanton hyväksi. Viime aikoina europarlamentaarikot ovatkin osoittaneet kiinnostusta esperantoa kohtaan entistä enemmän. Valtapelissä suurten halveksimaa esperanto voi yllättäen tulla tarvittavana kompromissina pelastamaan yhä järjettömämmäksi kääntyneen kielten ja kansakuntien valtataistelun

Aimo Rantanen.

Osoitteenmuutos

Lehden taittajan Ilkka Santtilan osoite ja puhelinnumero ovat muuttuneet. Uusi osoite on **Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki** ja puhelin **(09) 530 1804**. Sähköpostiosoite <ilkka.santtila@icl.fi> on säilynyt ennallaan.

Adressânço

La teknika redaktoro Ilkka Santtila loĝas nun en nova adreso: **Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki**. Nova telefonnumero estas **(09) 530 1804**. Retpoŝta adreso <ilkka.santtila@icl.fi> restas la sama.

Tasa-arvoa, kiitos!

Tasa-arvo on yksi yleisesti hyväksytyistä tavoitteista ja argumenteista. Tasa-arvoa vaaditaan naisille, vähemmistöille, eri ikäryhmille ja eri ammateissa toimiville. Tasa-arvosta on tullut muotiasia, jota kukaan ei ainakaan puheessa vastusta.

Mutta kun siirrytään käytäntöön tasa-arvovaatimukset sivuutetaan kuitenkin hyvin helposti.

Tasa-arvoa voidaan käyttää myös syrjinnän välineenä. Kun tasa-arvosta puhutaan ihmistä suurempien ryhmien kohdalla, ei tasa-arvoisuutta voida palauttaa ihmisyksilöiden tasa-arvoisuuteen.

Jos vielä kaksi, kyvyiltään ja voimavaroiltaan hyvin erilaista ihmistä voidaan asettaa samalle viivalle ilman, että kovin suurta vääryyttä tehtäisiin, niin kahden kielen asettamisessa samalle viivalle ollaan jo paljon vaikeammassa tilanteessa.

Vaikka samat oikeudet taattaisiinkin jokaiselle ihmisyksilölle, niin tällainen yksilökeskeinen, minimalistinen tasa-arvo merkitsee käytännössä sitä, että pienempi ryhmä, vähemmistökielen puhujat, joutuu heikompaan asemaan.

Rakenteellinen syrjintä, tasa-arvovaatimuksen varjolla, on syrjintää sekin. Kun esimerkiksi suomalainen poliitikko puhuu ruotsinkielen opiskelun vähentämisestä, hän unohtaa mainita asian toisen puolen, ruotsinkielisten suomen opiskelun.

Ja vaikka molempien väestöryhmien virallisia kielitaitovaatimuksia karsittaisiinkin, niin silti on selvää että suurelle osalle ruotsinkielisistä suomalaisista

suomen osaaminen on tärkeämpää kuin suomenkielisten enemmistölle.

Se, että uusille vähemmistöille annetaan lisää oikeuksia oman kielen käyttöön, ei pidä merkitä sitä, että nykyisiä oikeuksia kavennetaan.

Se, että on olemassa enemmän puhuttuja ja vähemmän puhuttuja kieliä, johtaa helposti siihen, että kielten valta-asemien välillä on eroja. Epätasa-arvo, niin virallinen kuin epävirallinenkin, aiheuttaa suurelle osalle maailman asukkaista kielellistä epävarmuutta, mikä näkyy oman äidinkielen väheksymisenä, kielen vaihtona, puolikielisyysnä ja etnisinä konflikteina.

Prahan julistus toteaaakin, että “suuret erot kielten valta-asemassa horjuttavat monissa kansainvälisissä asiakirjoissa annettuja takeita ihmisten yhtäläisestä kohtelusta kieliin katsomatta”.

Epätasa-arvo voidaan välttää vain siten, että vähemmistöille annetaan tasoitusta.

Oikea, kunnon tasa-arvo kielten ja kieliyhteisöjen suhteen, merkitsisi sitä, että kunkin ryhmän jäsenet opiskelisivat toistensa kieliä samaan tahtiin. Vain se takaisi sen, ettei jokin kielistä olisi vähemmän arvostettu eikä arvostusero johtaisi siirtymään “arvokkaamman” kielen käyttäjäksi.

Kun tasa-arvoa vaaditaan nykyään monella muullakin alalla, niin esperantisteina voimme vaatia: Vähän tasa-arvoa kieliasioissakin, kiitos!

Jukka Pietiläinen

Kiuj scias, taksas pozitiva...

En januaro 1997 la profesia nederlanda esplor-instituto NIPO sondis la opinion pri Esperanto de reprezenteca grupo de 501 nederlandanoj 16-50 jaraĝaj.

El la respondintoj 43 % ne scias, kio estas Esperanto. Tiu elcento estis 66 por junuloj 16-30 jaraj, 29 en la aĝgrupo 31-40 kaj 21 en la aĝgrupo 41-50.

El la nesciantoj multaj (10 %) opiniis ĝin la hispana (!) aŭ io hispanrilata. Post klarigo al nesciantoj ke temas pri internacia lingvo, la instituto demandis la opinion pri la taŭgeco de Esperanto en internaciaj rilatoj. 51 % opinias, ke la enkonduko de Esperanto plibonigos la internaciajn rilatojn. En la diversaj aĝgrupoj tiu elcento varias: 61 % en la grupo 16-30 jaruloj, 45 % ĉe 31-40 jaruloj kaj 43 % ĉe 41-50 jaruloj.

Iom pli ol la duono de la enketitoj opinias, ke enkonduko de Esperanto en la mezgradajn lernejojn estos pozitiva kontribuo al la internaciaj rilatoj. Ĉe la res-

pektivaj grupoj (16-30, 31-40 kaj 41-50) la elcentoj estas 57, 48 kaj 48.

Tiun opinion havas 66 % de la malpli edukitaj, 58 % de la meze edukitaj kaj 38 % de la alte edukitaj enketitoj. Virinoj (58 %) estas pli pozitivaj pri enkonduko de E-o en la mezgradajn lernejojn ol viroj (45 %).

Unuflanke la rezulto de la enketo ne mirigis la landan asocion: ĝi jam konstatis, ke multaj homoj ne scias, kio estas Esperanto. Aliflanke ĝi surpriziĝis, ke 2/3-a parto de la juna generacio opinias, ke la enkonduko de Esperanto pozitive influos la internaciajn rilatojn.

La diskonigo de la rezultoj de ĉi tiu enketo kaŭzis vastan reagon de la gazetaro, televido kaj radio. Multaj intervjuoj estis publikigitaj en gazetoj, televid- kaj radio-stacioj.

*Hans ten Hagen
ten.hagen.esperanto@pi.net*

Pludaŭras la omaĝoj al Ada Sikorska-Fighiera

Multloke tra la mondo plue okazas ceremonioj kaj omaĝoj dediĉitaj al la memoro de Ada Sikorska-Fighiera, kiu redaktis la gazeton "Heroldo de Esperanto" dum ĉ. 36 jaroj: ŝi mortis en Torino (Italio) antaŭ preskaŭ unu jaro.

La Internacia E-Kongreso okazinta en Valencio (Hispanio) kaj la UK en Ade-

laido (Aŭstralio) nomis salonon je ŝia nomo: en la UK polaj geaktoroj ludos teatraĵon bazitan sur ŝia taglibro. Monda Turismo aperigis paĝon en Internet pri Ada; Pola Radio decidis memorigi ŝin dum plena dissendo la 1-an de novembro.

(GCF)

Blua Aventuro en Jyväskylä kaj Saarijärvi

30.06. – 06.07.97

*Komencantoj, progresantoj, kurs-
aranĝantoj, instruistoj; germanino,
argentinano, norvego, finnoj: geaven-
turemuloj en preĝeja boato. Konfuzo,
kaoso de remiloj, akvoŝprucaĵoj, ek-
krioj, ekridoj – sed post nelonge: nur
rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni
remis la vojon celitan!*

Tre varma estis kaj vetere kaj etose la blua aventuro, la 29-a somera studsemajno en Jyväskylä, aranĝita de la tieaj Somera Universitato kaj Esperantoklubo. Ne nur dum la interkona kunremado ni sentis nin sidantaj ”en la sama boato”, kvankam ni laboris en tri grupoj. La elementan kurson ĉeestis tri, la progresigan kurson ses kaj la studrondon naŭ lernemuloj.

La temo de la semajno estis akvo. Ni pridiskutis flue kaj vigle ĝian signifon al la vivo, al la industrio, al la komerco kaj al la turismo, disvastiĝon de la kulturo laŭ akvovojoj, naskiĝon de lagoj pro la glaciepoko, akvoplantojn kaj -bestojn, naturfortojn, akvohobiojn, purigadon de akvo ktp.

Eĉ la lecionoj pri gramatikaĵoj estis ne sekaj sed mirinde sukaj, dank’al la talentegaj instruistoj Raita Pyhälä en la elementa kaj Atilio Orellana Rojas en la progresiga kursoj.

Ĉiuj kursanoj kune ekskursis al la naturobservada pado en la valo de rivero Tourujoki, al la naturscienca muzeo de la universitato kaj al la purigadejo de uzita akvo. Kune ni ankaŭ ĝuis la ves-



*La interkona
vespero de la
Blua Aventuro.
Foto: Pentti
Makkonen*

perajn aventurprogramojn, eĉ danĝerajn, ĉar pro la konkurso pri tranĉado de pinŝelaj boatoj tri vunditoj bezonis sparadrapon...

Post la kurso sesopo el ni vojaĝis por la semajnfino al la Jogo-Instituto de Finnlando en Saarijärvi. La vizito komencis per senintenca praktika akva ekzerco! Dum kelkdek minutoj pluvegis kaj hajlis tiom, ke ni ne povis lasi la aŭton por kuri al la loĝejo, kvankam estis nur du-tri metroj ĝis la pordo, kaj duono de la vojo forfluis pro la inundo.

Ni aŭdis prelegeton pri jogo de la du esperantistoj, kiuj laboris en la Instituto, kaj partoprenis ioman ekzercadon. Sabate ni niavice aranĝis vesperan programon por la joganoj. Ni rakontetis pri Esperanto kaj lernigis kelkajn kantojn al la aŭskultantoj, al kiuj tamen pleje imponis "Kampano Paavo de Saarijärvi" de Runeberg, deklamita de la tradukinto, Odd Tangerud.

Ni ankaŭ vizitis "ŝtonepokan" vilaĝon, promenis al proksima rapidfluo, naĝadis en la apuda lago kaj tre ĝuis la amikecan etoson en la Instituto.

Pasintjare la studsemajna aventuro estis verda, nun blua. Kiun koloron havos la venontjara?

Anja Karkiainen

En la unua kursovespero okazis komuna remado en preĝeja boato kun 14 remiloj. Jen kelkaj remintoj kontentaj post la remado: la unua paro Marjatta Niemi kaj Terttu Tyynelä, la dua Atilio Orellana Rojas (instruisto) kaj Anja Karkiainen, la tria Kati Lindell kaj Odd Tangerud, la kvara Nora Caragea kaj Raita Pyhälä (instruisto); malantaŭe staras Eila Tervahartiala kaj Norma Perälä. Foto: Seija Kettunen.



Maailma kylässä

24.-25.5.1997

'Maailma kylässä' estis aranĝo kiu okazis en la malnovaj stokejoj de la ŝtata fervoja kompanio en Helsinko. Ĝi konsistis el ekspozicio en la stokejoj kaj artaj aranĝoj de muzikaj kaj teatraj grupoj ekstere en pluraj tendoj. Pri organizaj laboroj respondecis Kehitysyhteistyön Palvelukeskus KEPA kaj la firmao PopZoo Promotions Oy, sed la aranĝon faris la ĉ. 150 organizoj kaj grupoj kiuj sin prezentis en la ekspozicio aŭ pere de muzikaj aŭ teatraj prezentoj. La ekspozicio estis malfermita je la 12-20-a horoj kaj eĉ post tio daŭris la koncertoj de muzikaj grupoj.

La nomo 'Maailma kylässä' bone ilustras la aranĝon tiel ke la finnlingvaj vortoj tradukiĝas en Esperanton kiel 'la mondo vizitas' kaj 'la mondo en vilaĝo'. Ambaŭ ŝajnis pravi kiam dum la du tagoj de la aranĝo vizitantoj povis diskuti ekz. pri helpado al senhejmaj infanoj, demandoj de internacia solidareco aŭ aktivecoj de gejunuloj en Iisalmi ĉe koncernaj standoj, kaj poste manĝeti ekzotikaĵojn en afrika, amerika aŭ azia manieroj. Informoj pri la ekspoziciantoj estis riceveblaj sur ĉiu tablo kaj ne nur manĝaĵoj sed ankaŭ libroj, poŝtkartoj, ornamaĵoj, vestaĵoj ktp. estis vendataj. La etoso estis agrabla, plej diversaj homoj povis por si trovi ion interesan en la ekspozicio aŭ inter la artistoj de diversaj stiloj – kelkaj konataj kaj kelkaj ne tiel. Programo estis bunta kaj tiel estis ankaŭ la vizitantoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando kontribuis al la ekspozicio prezentante sian

agadon kaj la lingvon Esperanto en sufiĉe modestaj kondiĉoj. Ĉe du metrojn longa tablo staris du-tri deĵorantoj kaj respondis al demandoj, kiuj plejparte montris sinceran intereson al Esperanto. Multaj vizitantoj nur vagadis preter la tablo sed ofte oni povis tamen audi komenteton, kio montris ke ankaŭ preterpasantoj notis nian budon. Al interesitoj la deĵorantoj provizis informilojn; sur la tablo estis ekz. novigita versio de *Esperanto tänään*, manifesto de Prago en kvar lingvoj, informiloj de lokaj kluboj kaj informoj pri venontaj kursoj. Krome eblis rigardi gazetojn kaj librojn kaj eĉ aĉeti librojn kaj t-ĉemizojn – vendoj kiel atendite estis malmultaj sed tio ja ne estis la ĉefa kaŭzo por partopreno. Tekstoj sur paperfolioj pendigitaj super la tablo montris kiel aspektas la lingvo. La demandoj variis el kio Esperanto estas al vortfarado, literaturo kaj tiel plu. Unu junulo petis min diri al videobendo konsilon por lia baldaŭ komenonta geedza vivo. Mi babilis ion – kion vi estus dirinta?

La du majaj tagoj estis sufiĉe malvarmaj kaj saĝaj deĵorantoj sin bone vestis por la aranĝo. Dum la dimanĉo la vento blovegis kaj ĉien portis malgrandajn sablerojn. Tamen ĉion savis la sento, ke ni povis antaŭenigi scion pri Esperanto, montri nian ekziston kaj agadon. Kaj ne vane, ĉar, krom kelkaj malnovaj amikoj, ni povis renkonti relative multajn interesitojn. Bedaŭrinde la aranĝo ne ricevis tiom da publikeco en amaskomunikiloj

kion ĝi meritis, sed tamen Esperanto estis menciita en la artikoleto de semajna aldono de Helsingin Sanomat. Pri radio-programoj ne estas scio, tamen neniu intervjuanto aperis ĉe nia stando.

Dankon al deĵorantoj, planantoj, vizitantoj kaj aliaj kiuj helpis.

Päivi Saarinen

Anna-Liisa Heikkinen
deĵoris en la ekspozicio.



– por komencantoj –

Hundoj veturas

En Murmanko mi vidis grandan hundon en aŭtobuso sen mastro. Miaj geamikoj rakontis, ke kelkaj familioj iras al sudo kaj ne kunprenas la hundon. Aŭ la familio nur libertempas kaj poste revenas al Murmansk kaj retrovas la hundon, aŭ la familio foriras por labori kaj loĝi en alia, pli suda urbo. La hundoj restas en Murmansk kaj neniu prizorgas ilin. Ili mem devas serĉi manĝaĵon kaj dormolokon, eble ankaŭ novan mastron. Amikaj homoj donas ion por manĝi al la hundoj, kaj la hundoj rememoros. Ili revenos al la loko, kie ili renkontis amikajn homojn. Ili povas eniri en aŭtobuson, veturi al iu haltejo, kiun ili rememoras kaj tie eliri. Ili povas kunpromeni kun fremduloj kaj kuri kun kurantoj. Ili klopodas sekvi homon al lia hejmo kaj ŝovi la nazon inter la pordon, sed ili neniam ŝajnis koleraj kaj neniam timigis homojn. Ankaŭ tre belajn purajn raso-hundojn oni povas vidi sen mastro. Eble estus malpli koste vojaĝi al Murmansk por preni tian hundon ol aĉeti hundon en Finnlando.

Saliko

Atilio sopiras al la tuta mondo



Atilio Orellana Rojas estis intervjuata dufoje dum la somero. Unue lin renkontis Saliko en Jyväskylä kaj poste Sylvia Hämäläinen en Adelajdo (kun demandoj el Aimo Rantanen).

Kion vi, Atilio, ŝatus diri al la legantoj?


Por ni esperantistoj gravas, ke ni ne estu tro fermitaj en nia komunumo, sed ni igu nian pensmanieron plejeble internacia. Ni malfermu nian menson al la tuta mondo. Tio dikigos nian komunumon kaj igos ĝin pli multflanka.

Kiel ni havigu pli da instruistoj por la lingvo Esperanto? Aŭ ĉu ni unue havigu pli da lernantoj por la instruistoj?

Miaopinie la unua tasko estas pliklerigi la nunajn instruistojn kaj ne nur pri la lingvo Esperanto sed pri la instruado mem. Ni ja perdas lernantojn, se la instruantoj ne uzas taŭgajn metodojn. Ni devas ankaŭ plialtigi la prestiĝon de Esperanto en la mondo kaj pretigi nin alfronti la demandojn, postulojn kaj diversajn sintenojn de ne-esperantistoj.

Ĉu vi, "fluganta Esperanto-instruisto", ne sentas vin "senhejma birdo"? Ĉu vi ne sopiras al via hejmlando?

Tute ne! Mi sopiras al la tuta mondo. Mi havas amikojn tie kaj tie ĉi, kaj la amikoj plej gravas por mi. Mi feliĉas, se mi povas ilin ofte renkonti.



Kiom da landoj vi, Atilio, vizitis ĉijare E-instrucele?

En almenaŭ sep landoj; mi estis ĉijare en Eŭropo, Ameriko kaj Oceanio.

Kion vi opinias pri la finna Esperantomovado el la vidpunkto de eks-prezidanto de sudamerika landa E-asocio?

Min mirigis la fakto ke vi havas tre bonajn kondiĉojn por pluvivigi kaj antaŭenigi la tutan movadon en via lando. Mi konstatis ke vi havas nun la eblecon ekz. en Tampere havi propran sidejon, kaj tio multe helpas al vivigo de la aktivado de Esperantoorganizo ĝenerale. Grava afero estas ankaŭ, ke vi havas la eblecon organizi kursojn dum somero. Tio estas afero, kiun vi devus multe flegi, por ke ĝi vivigu la movadon ne nur lokan kaj landan sed ankaŭ de aliaj mondopartoj.

Kaj krome la fakto, ke vi tiom brile organizis la universalan kongreson montaras, ke vi havas la kapablon multflankan por la movado. La kondiĉoj en suda Ameriko estas tute aliaj.

Kiel vi estimatus la E-lingvoscion de viaj finnaj lernantoj? Kun kiuj problemoj en E-lernado ni devus plu fari laboron? Kio en la E-lingvoscio de la finnaj lernantoj diferencas de alilandaj lernantoj de vi?

Unu afero, kiun mi tuj en la unua tago kontrolas ĉe miaj lernantoj estas la prononcado, ĉar mi pensas ke ni devus atingi

nian pli malpli norman prononcadon de la lingvo. Certe finnoj ne parolas malpli bone ol aliaj eĉ ne pli brile ol aliaj. Ĉiuj esperantistoj en diversaj lingvokomunumoj havas malfacilaĵojn kun tiu aŭ iu alia sono. Bonŝance min mirigis en la kursoj en Tampere kaj Jyväskylä la bona kono de la lingvo, kiun la homoj havis. Do ni ne devis resti ĉe tiaj komencaj ŝtupoj sed mi multe emfasis la lernadon de la artikolo sed tamen ankaŭ la prononcadon.

Kion vi pensas pri la estonteco de Esperanto mondscale? Ĉar vi vizitis ĉiujn kontinentojn, kie la instruado kaj E-movado povus havi la plej optimisman antaŭvidon?

Mi pensas, ke evidente la estonteco de Esperanto estas tute brila, tutcerte, ĉar ja por tio mi laboras kaj estas tio kio konstante donas al mi energion kaj entuziasmon. Mi konkrete vidas, ke la kondiĉoj en kelkaj mondopartoj estas pli esperigaj ol en aliaj. Mi fidas, ke dank al la Kampanjo 2000 ni sukcesus vekti esperantistojn, klubojn kaj landajn asociojn trovi rimedojn konigi Esperanton ĝenerale kaj konigi la lingvon al pliaj homoj. Mi vidis multe da gejunuloj kaj en Brazilo kaj en Ĉinio, kaj tio donas al mi la impreson, ke vere nia lingvo povus eniri pli forte en junularaj movadoj. Ili estas tiuj, kiuj anstataŭos nin iam en la estonteco. Ni tamen devas kapti ilin iamaniere laŭ la intereso kiun ili mem havas.

Kio diferencigas la argentinan E-movadon el aliaj landaj movadoj en Sud-Ameriko?

Unue ni estas malmultaj, ne pli ol 200 homoj dum en Brazilo troviĝas 3000 esperantistoj. Aldone al tio granda problemo estas la distancoj, ĉar Argentino

estas grandega lando. La kostoj por multmilaj distancoj estas vere astronomiaj kaj homoj ne povas ĉiam ĉeesti kongresojn kaj renkontiĝojn. Ni klopodas regionigi la agadon.

Kion vi opinias pri la eblecoj de E-movado en la savado de minacataj indianlingvoj kaj -triboj sur la tuta kontinento Ameriko? Kion ni – unuopaj ordinaraj finnoj – povas fari por la afero?

Ĝenerale esperantistoj en Latin-Ameriko ne konscias pri la varieco de la popoloj kaj pri la giganta kvanto de la lingvoj en nia kontinento. Tamen mi klopodas enkonduki tiun temon en niajn kongresojn. Kiam mi instruis en Argentino ni inter la kursanoj kolektis kuracilojn, vestaĵojn aŭ ion kion ni povus transdoni al tiuj popoloj. Ni simple iris al tiuj lokoj kie la indianoj loĝis, vivis kun ili kaj donis kion ni portis. Ni neniam klopodis unue trudi Esperanton al ili, ni eĉ ne diris al ili ke ni estis esperantistoj. Ni diris ke ni sciis pri ili, ke ili bezonas iujn aferojn kaj ni venis por helpi ilin. Mi esperas, ke iom post iom niaj esperantistoj konsciis pri tia indiana fono, kiun preskaŭ ni ĉiuj en Ameriko havas, aŭ pro deveno aŭ pro konstanta kontakto kun ili en lernejoj, laborejoj kaj sustrate.

Estus ege interese se finnaj esperantistoj iom pli konatiĝu almenaŭ per libroj, ankaŭ per vizitoj pri tiuj niaj popoloj. Estas bonfaraj organizoj, kiuj multe helpas indianojn ekz. tiuj vilaĝoj de SOS. Tra tiuj vi per malgrandaj monsumoj povas vere helpi. Bele estus se en viaj kluboj iu levu la demandon kaj prelegus pri indianoj. Tiam estus pli facile senti sin ligita al la afero kaj kiam aperos ebleco helpi estus pli facile fari tion.

Joel Vilkki kaj Esperanto

Rektoro Joel Vilkki skribigis la nomon de la paroko (ekde 1993) urbo Somero en la mondmapo de esperantanoj. Sed kiu li estis kaj kion li faris?

Joel Adiel Vilkki naskiĝis en Kalvola la okan de aŭgusto 1899 kiel filo de pastro Juhani Vilkki. Li fariĝis studento el la finna liceo de Turku 1918 kaj magistriĝis en 1924 studinte kemion, matematikon, fizikon kaj astronomion en la universitatoj de Helsinki kaj Turku. Poste li instruis matematikon kaj fizikon en lernejoj de Toijala, Viitasaari, Kangasala kaj Helsinki. En 1929 li transloĝiĝis al Somero kaj laboris tie en la geknaba liceo kiel rektoro kaj instruisto pri matematiko kaj fiziko.

Li edziĝis en 1925 kun Suoma Eliisa Kallo, kaj la geedzoj ricevis du filojn kaj du filinojn.

Kiel multaj lernejoj knaboj, ankaŭ la juna Joel Vilkki ĉagreniĝis pro la devigo lerni plurajn fremdajn lingvojn kun plimalpli malfacilaj gramatikoj kaj vortprovizoj. Jam antaŭ la unua mondmilito li aŭdis pri Esperanto, havigis al si lernilojn kaj plenlernis la lingvon. Sed antaŭ ol trovi eblecojn por multflanke uzi Esperanton li aŭdis, ke poste estis faritaj aliaj planlingvoj, kiujn multaj sciencistoj rekomendas kiel variantoj pli perfektaj. La studento Joel Vilkki sentis moralan devon transiri al la planlingvo ido, sed antaŭ ol li plenumis tiun devon, aperis planlingvo ”pli perfekta eĉ ol ido”, kun la nomo occidental. Li ne plu fidis Esperanton, sed ankaŭ ne sufiĉe fidis idon aŭ

occidentalon. Tiam li ĝoje eksaltis, kiam finfine la tutmonde respektita lingvosciencisto Otto Jespersen en 1928 prezentis planlingvon programe faritan nome novial. Nun ŝajnis esti klare, kiel aspektas planlingvo laŭ ĉiuj vidpunktoj plej perfekta. Disvastigado de novial estis tasko, al kiu valoris dediĉi siajn fortojn. Joel Vilkki tradukis finnen la bazan libron de Jespersen, kaj la traduko titolita Kansainvälinen kieli aperis en 1931.

Pri tio aŭdis en 1934 pastro Hemmo Tietti, kiu ankaŭ estis iranta saman vojon: kiel knabo al Esperanto, kiel studento for de Esperanto. Li havigis la libron de Jespersen kaj prenis kontakton kun la tradukinto. Somere 1935 li pasigis kelkajn semajnojn en la hejmo de Joel Vilkki. De matenoj ĝis vesperoj ili buŝe uzadis inter si la lingvon novial kaj konstatis ke ĝi vere estas bone parolebla – sed ĉu ankaŭ pli bone ol Esperanto?

Ili disiris kaj ambaŭ por si mem pripensadis la spertaĵon. En aŭtuno de la sama jaro Tietti subite venis al Vilkki kaj antaŭ ricevi la manon de bonvenigo ek-kriis: ”Novial fluis, sed ĝi tamen fluis malpli glate ol Esperanto.” Dum iom da tempo Vilkki volis kontraŭdiri, sed subkonscie li jam sciis, ke Tietti pravis. Post du horoj da diskutado ili konstatis, ke nefakulo per instinkto kreis lingvon pli perfektan, ol fakuloj per racio.

Ĉi poste komencis la celkonscia laborado de Joel Vilkki. Ekde 1935 li estis la ĉefdelegito de IEL kaj UEA en Finnlando kaj la delegito de UEA en Somero. En

somero 1946 li proponis al la estraro de la geknaba liceo, ke Esperanto estu deviga fako en la unua klaso. La estraro konsentis unuanime, sed la ŝtata lerneja administracio ne konsentis tion, kaj Esperanto fariĝis nur libervola fako. Tamen 31 el la 41 lernantoj partoprenis la lernadon de Esperanto kaj ĝi daŭris ankaŭ dum sekvontaj jaroj.

En 1958–1963 estis farata eksperimento, favorata ankaŭ de la lerneja administracio, por klarigi, kiel lernado de Esperanto efikas la kapblon lerni fremdajn lingvojn ĝenerale. Al paralelaj klasoj B kaj C oni instruis la germanan kiel fremda lingvo. B-klasoj komencis per la germana ekde la unua klaso sed C-klasoj komencis per Esperanto kaj transiris al la germana pli poste. Post kvin jaroj la C-klasananoj ricevis en la germana pli bonajn rezultojn ol la B-klasananoj.

En komenco de la sesdekaj jaroj estis tia situacio en nia lando, ke la Esperantaj vortaroj de Vilho Setälä estis baldaŭ finvendotaj, kaj onidire neniu eldonejo ne plu emis presigi novajn Esperantovortarojn. Samideanoj malesperis: ”Ni ne havas monrimedojn por mem presigi vortarojn, la nunaj vortaroj baldaŭ ne ekzistos, kion ni faros?” Sed Joel Vilkki ne malesperis. Li decidis persvadi la eldonejon Werner Söderström Oy enpreni Esperanton en sian serion de malgrandaj ruĝaj vortaroj. Li sukcesis, vizitinte multajn fojojn la subdirektorojn kaj fine la ĉefdirektoron mem. Poste li mem manuskripte verkis la vortaron, kaj en 1963 aperis la ruĝa

vortaro Finna-Esperanto-Finna.

Sed ankaŭ tiu siavice finvendiĝis, kaj Joel Vilkki komencis prepari novan ĝustigitan eldonon. La laboron tamen interrompis lia morto la 14-an de julio 1976.

Lia filino Heljä Favén daŭrigis la laboron, kaj en 1982 aperis nova eldono, Suomi-Esperanto-Suomi poŝvortaro en verdblankaj kovriloj, enhavanta ankaŭ legolibreton.

Erik v. Herten

Sopiro

*Sopiras mi cin,
ne mi rajtas al cia lito,
ne sentas maljunul-mi sin
kiel viro de egoforto.*

*Floro de mi ci estis,
kiel longe tio daŭri povis,
vazfloro ci hejma restis,
ĉiun tagon akvo cin nutris.*

*Ci, alta la pino
mi pingrimpanto,
Matura, ci, vino,
soifa, mi, vinŝatanto.*

– *Afrodizio* –

Esperantoliitto muutti uusiin tiloihin

Suomen esperantoliitolla (EAF) on nyt uusi osoite. Liitto osti uuden toimiston 30. kesäkuuta Vapaa-ajattelijain liitolta ja muutto tapahtui 2. elokuuta. EAF omistaa toimiston yhdessä Helsingin esperantoseuran kanssa. Uuden toimiston osoite on Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. Toimisto sijaitsee Hakaniemen torin ja Kallion kirkon välillä. Liiton puhelinnumero pysyy entisenä.

Uudesta toimistosta on tarkoitus tulla esperantistien toimintakeskus, jossa voi-

daan pitää kokousten lisäksi kursseja ja erilaisia tiedotustilaisuuksia ja jossa voidaan työskennellä. Toimistoon hankitaan myös tarpeelliset koneet ja laitteet, kuten telefax ja kopiokone.

Toimiston hankkiminen tuli mahdolliseksi Aino ja Ahto Linjan testamenttilahjoituksen myötä. Linjojen asunnosta saatiin myös osa uuden toimiston kalustuksesta.

Muuttoon osallistuivat Antti Mikkola, Raimo Strandén, Anna-Liisa Heikkinen, Kari Kettunen, Terja Nylund ja Jenny Lehtola sekä liiton hallituksen jäsenet Seija Kettunen, Jukka Laaksonen, Jukka Pietiläinen, Raita Pyhälä, Päivi Saarinen ja Tuula Virolainen.

Ennen muuttamista toimisto pestiin ja maalattiin.

Ensimmäinen suurempi tilaisuus uudessa toimistossa pidettiin taiteiden yönä 28.8., jolloin esperantistit ja ohikulkijat saattoivat tutustua esperantorunouteen teen ja kahvin voimalla.

Toimisto on avoinna tiistai-iltaisina. Esperantistit ovat tervetulleita tutustumaan liiton uuteen päämajaan.

Uusi toimisto on myös varattavissa tilapäiseen yöpymiskäyttöön, hintaan 100 markkaa yö.

Koko perhe kunnostustöissä. Antti Mikkola maalaa uutta toimistoa. Mukana myös tytär Aura.



Onnistunut esperantokongressi Australiassa

Kampanja 2000 sekä esperantoliikkeen suhteet muihin järjestöihin leimasivat keskusteluja 82. esperanton maailmankongressin aikana 1.200.000 asukkaan Adelaidessa, Etelä-Australian teollisuuskeskuksessa, 19.–26.7.97. Kongressi oli hyvin järjestetty ja Australian esperantoliiton sekä Puolan radion kotisivun kautta sitä saattoi seurata kaikkialta maailmasta. Kongressilehti oli nimeltään ”Lumilo”, englantilaisen upseerin nimen mukaan. Hän oli alkuunasaattamassa Adelaiden huimaa kehitystä. Keskiiviikon retkillä tutustuttiin mm. aboriginaalien oppilaitokseen ja kengurusaareen. Suo-

malaisista kahta muistettiin kongressin aikana. Heti lauantaina 19.7. valittiin UEA:n kunniajäseneksi Liisi Oterma ja ennen kongressin loppua sai siunauksensa Jouko Lindstedtin sanakirjahanke. UEA:n jäsenmaksut eivät tule kokemaan alennusmyyntiä. Kampanja 2000 ja esperanton monipuolisempi levittäminen maailmanlaajuisesti pitävät jäsenmaksut ainakin ennallaan. Kongressiin osallistui kaikkiaan 1244 ihmistä. Kongressin lopussa kongressilippu siirtyi Montpellierin edustajien haltuun. Ensi kesän esperanton maailmankongressin teema on ”Kulttuurien välinen silta”.

Uusi sanakirja tekeillä

Uuden suomi-esperanto-suomi -sanakirjan tekeminen alkaa tänä syksynä. Kirjan päätoimittajaksi on valittu Jouko Lindstedt. Sanakirjan on tarkoitus val-

mistua seuraavien kymmenen vuoden kuluessa. Sanakirjan tekemiseen pyritään hankkimaan myös esperantoliikkeen ulkopuolista rahoitusta.

Puheenjohtaja Jukka Pietiläinen allekirjoittamassa kauppakirjaa. Myyjää edustaa Kimmo Sundström. Kuva: Päivi Saarinen.



Jubilea festo en Sankt-Peterburgo

Sankt-Peterburga E-societo "ESPERO" la 25-an de septembro festas 105-jariĝon. Gastoj estas invititaj kunfesti la jubileon de la 20-a ĝis 30-a de septembro 1997.

En la programo:

- ekskursoj tra la urbo kaj vizito de muzeoj kaj teatroj de Sankt-Peterburgo;
- renkontiĝoj kun lokaj kaj alilandaj esperantistoj, eminentuloj de Sankt-Peterburgo kaj Rusio;
- prelegoj pri diversaj temoj: Raraj libroj pri Esperanto (Maria Abolskaja), Esperanto kaj turismo (Anna Butkeviĉ), Radio kaj Esperanto (Valeria Cvetkova), historio de E-movado en Peterburgo (Nelli Kublanova), sana vivmaniero (Sergeo Ĉarov), simpla akupunkturo (prof. Yu Bin), vegetarismo (Bronoslav Ĉupin), la Kosmologio de Martinus (Aleksandro Kogan), saniga gimnastiko (Nikolao Kratjuk) k.a.;

• renkontiĝo kun lokaj ĵurnalistoj kaj kun legantoj de "Vestnik Esperanto".

Petu aliĝilon ĉe la Organiza Komitato: abonkesto 130, 197022 Sankt-Peterburgo, Rusio, tel/fakso +7 812 234 47 59, retpoŝto: <alex@asisto.spb.ru>

La 2-a internacia himalaja rekontiĝo

Nepala Esperanto-Asocio organizas de la 26-a de februaro ĝis la 7-a de marto 1998 renkontiĝon por internacia publiko.

La renkontiĝo donas al partoprenantoj konkretan imagon pri la vasta familio loĝantaj en diversaj anguloj de la terglobo kaj konkretan kontakton kun la naturo en la ombro de Himalajo. Informoj kaj aliĝoj: Sierra Travel and Tours (P) Ltd. P.O.Box 3565, Kathmandu, Nepalo. Tel- 00977-1-222985, Fakso 00977-1-228194.

El la plena kalendaro de E-aranĝoj

07. septembro – 31. majo

Internacia Studejo pri Turismo kaj Kulturo 1997/98, Bydgoszcz. Inf: Monda Turismo, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85094 Bydgoszcz, Pollando. Tel: +48-52-415744. Rete: turismo@bydg.pdi.net

27. septembro – 06. oktobro

23-a Int. Forumo pri E-Turismo kaj Kulturo. Inf: Esperantotur, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel: +48-52-415744. Rete: turismo@bydg.pdi.net

27-28. septembro

Tazio Carlevaro Piron en KCE-monatfino. Inf: Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds,

Svisio. Tel./fakso: +41-32-9267407

01-05. oktobro

Aŭtuna stud-ekzamena sesio pri turismo kaj kulturo. Inf: Monda Turismo, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. Tel: +48-52-415744. Rete: turismo@badg.pdi.net

25-26. oktobro

29-a Korea Esperanto-Kongreso en Gjonxu. Inf: Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. Kesto 4258, Seulo 100-642, Koreio. Telefakso: +82-2-741-1291. Reto: keast@soback.kornet.nm.kr

Kuracistoj serĉataj

Matthias Kamp, medicina kuracisto kaj aŭtoro de la libro "Revolution in de Medicin" (revolucio en la medicino), kuracista dokumentado de saniĝo per spiritaj fortoj, serĉas esperanto-parolantajn kuracistojn, naturkuracistojn k.a. Li gvidas la medicin-sciencan fakgrupon de la Amikaro Bruno Gröning. Ĝi estas unu el la tutmonde plej grandaj grupoj pri spirita saniĝado, en kiu ĝis nun ankoraŭ ne ekzistas Esperanto-sekcio en la medicina fako.

Interesiĝantaj kuracistoj, sed ankaŭ personoj el aliaj kuracaj profesioj, turnu sin kun mencio de la profesio kaj komprenataj lingvoj al la respondeculo de la amikaro pri Esperanto: Detlef Meier, Hauffstr. 15, D-63071 Offenbach, Germanio.

<ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt>

25-26. oktobro

Reinhard Selten en KCE-monatfino. Inf: Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel./fakso: +41-32-9267407

16. novembro

10-a Esperanta Renkontiĝo de Okcidenta Regiono. Inf: E-Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono, Rua Coronel Agostinho 126, Fundos, Campo Grande, BR-23050-360 Rio de Janeiro, RJ, Brazilio

29-30. novembro

Birthe Lapenna en KCE-monatfino. Inf: Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel./fakso: +41-32-9267407

VEB-adreso ŝanĝiĝis

Ekde nun VEB (Virtuala Esperanto-Biblioteko, la centra E-paĝo en la reto) havas la novan kaj facilegan TTT-adreson:

www.esperanto.net/veb/

Tiu ĉi adreso (espereble) restos daŭre valida. La malnova adreso ĉe mia laborejo ankoraŭ funkcios dum kelka tempo plu, sed mi jam petas vin aktualigi viajn ligojn. Dankon!

*Martin,
la VEB-mastro*

Adelaiden kävijöille

Suomi–Australia -yhdistysten liitto ry:n Bumerangi-lehdessä ilmestyi tämän vuoden keväänä juttuni "Esperanton maailmankongressi 1997 Adelaidessa".

Tarjoaisiko joku kongressinkävijöistä jatkona oman kongressiraporttinsa samalle lehdelle, osoitteella: Bumerangin toimitus, Suomi–Australia -yhdistysten liitto ry, Mariankatu 8, 00170 HELSINKI?

Pentti Makkonen

✉ Korespondi deziras

Japana esperantisto kaj ret-uzanto interesiĝas pri Finnlando.

<takekoki@mxu.meshnet.or.jp>

50-jara pola viro deziras korespondi kun finnlandaj gesamideanoj. Al liaj ŝatokupoj apartenas i.a. kolektado de telefonkarto kaj moneroj. Skribu al: Wojciech Milewski, P.O.Box 13, PL-88-140 Gniewkowa, Pollando.

La estraro kunvenis

La estraro de EAF havis someran renkontiĝon kaj kunvenon la 14-15-an de junio en Lahden kansanopisto.

La celo estis diskuti kaj planadi la agadon en pli libera formo. La aranĝon partoprenis ankaŭ la edzoj kaj edzinoj de la estraranoj.

La diskutado pri novaj planoj kaj perspektivoj estis vigla kaj formiĝis bonaj ideoj por pritrakto kaj realigo.

Laborgrupoj fariĝos nova, pli profesia labormaniero de la estraro. Laborgrupoj pri fakaj temoj kiel instruado, informado, varbado, financoj ktp. preparas aferojn por pritrakto de la estraro kaj kunigas la estraron pli bone kun la lokaj societoj. La laborgrupoj ankaŭ planas la agadon pli detale ol la estraro ĝis nun faris. La unuaj planoj jam petitaj el formiĝantaj laborgrupoj estas pri instruado kaj informado. La laborgrupoj funkcios plejparte per letere kaj telefone.

La estraro decidis ankaŭ havi seminariojn por fari agadplanon kaj buĝeton jam frue antaŭ la jarkunsido.

Unu parto de la somera seminario estis vizito al bieno Ali-Seppälä en Orimattila, kie Börje Eriksson starigis Esperanto-agejon. La bieno estas plena da artaĵoj de Börje kaj li rakontis pri siaj planoj. La celo de Börje estas starigi societon, kiu prizorgu pri la praktikaĵoj.

En Lahti la estraro havis ankaŭ pli oficialan kunvenon, kiun partoprenis ĉiuj estraranoj krom Raita Pyhälä kaj Heta Kesälä.

La estraro informiĝis ke Lee Chong-Yeong kaj Mark Fettes ne povas veni por 90-jara festo de EAF.

Okazos lingvofoiro en Jyväskylä la 25-an de oktobro. Dum la aranĝo estos prezentataj 20 lingvoj inkluzive Esperanton.

La estraro decidis, ke la asocio partoprenos la nokton de artoj en Helsinki la 28-an de aŭgusto kaj librofoiron en Turku 3-5-an de oktobro.

La estraro rajtigis la kasiston sendi peton pri nuligo de aldonvalora imposto de la asocio pro malgrandaj enspezoj.

La estraro decidis aĉeti uzitan modemon por Esperantolehti. La estraro decidis kontakti la eldoniston de Jen nia mondo 1 kaj 2 lernolibro pri eventuala aĉeto de la stoko.

La estraro informiĝis, ke la loĝejo Linja estis vendita kaj ke la aĉeto de la nova oficejo estos farita fine de junio. La estraro decidis, ke flanke de EAF la ŝlosilojn havos la prezidanto, la sekretario kaj la kasisto. La estraro decidis, ke tranoktado en la nova oficejo kostos 100 mk po nokto.

La estraro decidis mendi stampilon kun la centjara emblemo kaj la nomo de la asocio en Esperanto kaj la finna.

La estraro diskutis pri la proponoj por vendebla leterpapero kaj decidis peti netan desegnon de unu el la proponoj.

La estraro de EAF kunvenis la 2-an de aŭgusto en la malnova oficejo. La kunsidon partoprenis ĉiuj estraranoj krom

Sylvia Hämäläinen, Heta Kesälä, Matti Lahtinen kaj Anna-Liisa Ali-Simola, kiuj vojaĝis. La kunsido daŭris 3 horojn.

La estraro aŭdis raportojn pri someraj aranĝoj, en Tampere someran kurson partoprenis 21 personoj kaj en Jyväskylä 18. Esperantan diservon en Vesanto la 27-an de julio partoprenis ĉirkaŭ 30 personoj.

La estraro decidis vendi la akciojn de Sampo, kiujn la asocio ricevis pro sia assekuro en tiu kompanio. La estraro decidis pagi la tantiemon pro venditaj ekzempleroj de Muminvalo, kiu restis nepagita ĝis nun. La estraro decidis havigi bankfakon en Postipankki kaj sendi varbleteron pri membreco al nepagintaj membroj.

La estraro decidis membriĝi en Eŭropa Esperanto-Unio, kies nova statuto estis akceptita en junio.

La estraro decidis proponi al urbo Somero starigi ŝildon al eksa hejmdomo de Joel Vilkki.

Buĝeta kaj agadplana seminario de la estraro okazos en Tampere la 15-an de novembro.

La Vintraj tagoj 1998 okazos en Kuopio en hotelo Rauhalampi.

La estraro diskutis pri la partopreno al la “nokto de artoj” en Helsinko. En la sama tago okazos gazetara konferenco por malfermi la novan oficejon.

La sekva kunsido de la estraro okazos dum Aŭtunaj tagoj.

Post la kunsido la estraranoj partoprenis la transloĝigon de la aĵoj al la nova oficejo.

Fariĝu patrono de EAF

Fariĝu patrono de Esperanto-Asocio de Finnlando, iĝu membro de Societo Nino Runeberg! Pagu la membrotizon 200 mk al la konto de la asocio.

Nino Runeberg (1874-1934) estis unu el la pioniroj de Esperanto-movado en Finnlando. Li lernis Esperanton en Parizo en 1901 kaj partoprenis la unuan Esperanto-kongreson en 1905. Li estis ankaŭ fondinto kaj plurjara prezidanto de Esperanto-societo Polusstelo en Helsinko kaj estrarano de EAF.

Liity liiton tukijäseneksi

Suomen esperantoliiton tukijäseneksi voit liittyä maksamalla Nino Runeberg Societon jäsenmaksun, 200 markkaa, liiton tilille. Jäsenyys ei sisällä liiton henkilöjäsenyyttä.

Nino (Hjalmar Johannes) Runeberg (1874-1934) on yksi esperanton alkuaikeiden suomalaisista aktiiveista. Hän oppi esperanton Pariisissa 1901 ja osallistui ainoana suomalaisena ensimmäiseen esperantokongressiin 1905. Hän oli myös Helsingin esperantoseura Polusstelon perustaja ja monivuotinen puheenjohtaja sekä Suomen esperantoliiton hallituksen jäsen.

Mikä on kampanja 2000?

Syyspäivillä Eerikkilän urheiluopistolla syyskuun 13-14. järjestetään keskustelu Esperanton maailmanliiton (UEA) Kampanja 2000:sta. Mitä kampanja merkitsee Suomen esperantoliiton kannalta?

UEA:n kampanjalla on kolme tavoitetta: kohottaa esperantoyhteisön järjestöllistä ja aatteellista tasoa, kohottaa esperanton arvovaltaa ja vaikuttaa kansainväliseen elämään.

Näistä tavoitteista erityisesti ensimmäisessä tarvitaan esperantoliittojen panosta. Tavoitteena on hankkia uusia jäseniä, hankkia uusia taloudellisia voimavaroja perinteisten lähteiden ulkopuolelta, parantaa liiton toimintaa ja hallintoa, järjestää tilaisuuksia, joiden aiheena on jäsenten kouluttaminen, ja parantaa esperanton opetuksen tilaa.

Monissa näistä asioista on jo tapahtumassa uutta, esimerkiksi liiton uusi toimisto mahdollistaa entistä paremman asioiden hoitamisen ja jäsenten kouluttamista tehtiin jo kongressiprojektin aikana. Nyt tätä on jatkettava ja sen lisäksi tarvitaan vielä lisää uusia ajatuksia.

Uudet jäsenet on saatava mukaan toimintaan, uusia nykyaikaisia opetusvälineitä on kehitettävä ja liiton taloutta on vahvistettava uusia rahoituslähteitä etsimällä. Nyt lähes kaikki tulot ovat peräisin jäseniltä muodossa tai toisessa. Eri-laiset säätiöt, rahastot ja valtion tuet ovat mahdollisia rahalähteitä.

Toinen tehtävä, esperanton arvovallan kasvattaminen, liittyy tiedotukseen ja suhdetoimintaan. Siinä tavoitteena on tie-

dotuksen nykyaikaistaminen ja parantaminen. Arvovalta merkitsee myös sitä, että esperantoliitto ottaa kantaa kielipoliitiikkaan ja kielten opetukseen. Tavoitteena on se, että esperantoliiton kantaa kysytään silloin, kun kieliasioista päätetään.

Prahan julistus määritteli esperanton liikkeeksi tehokkaan kielten opetuksen, kielellisten oikeuksien ja moninaisuuden sekä ihmisen vapautumisen puolesta. Nämä tavoitteet mahdollistavat yhteistyön myös muiden samankaltaisiin tavoitteisiin pyrkivien liikkeiden kanssa. Liittolaisten etsintä on aloitettava.

Kolmas tavoite on maailmanlaajuinen, mutta siinäkin UEA asettaa osan vastuusta eri maiden esperantoliitoille. Meidän on hankittava yhteyksiä kansainvälisiä asioita hoitaviin valtion viranomaisiin ja eri järjestöihin, joilla on yhteyksiä kansainvälisiin järjestöihin. Yhdessä muiden järjestöjen kanssa voimme käynnistää projekteja ja pyrkiä vaikuttamaan kansainvälisellä tasolla.

Vaikutusvalta riippuu paljolti arvovalta. Jos esperantoliitolla on konkreettista tarjottavaa, se pääsee mukaan toimintaan. Jos sen tarjoama asiantuntemus on riittävän korkeatasoista, sitä kuunnellaan ja sen kannanotoista ollaan kiinnostuneita.

Kampanja 2000:n tarkoituksena on se, että nämä "jossit" toteutuisivat. Mitä konkreettista sitten on tehtävä? Millaista jäsenkoulutusta nyt tarvitaan? Tule sanomaan mielipiteesi syyspäiville!

Jukka Pietiläinen

E-gazetaro

Esperantolehti malfermas nun rubrikon por prezentado de esperantlingvaj gazetoj kaj revuoj. La unua estas ESPERANTO aktuell, la organo de GEA, Germana Esperanto-Asocio. Ĝi estas parto de membrokotizo al GEA. Kiel unua impresio la leganton de ESPERANTO aktuell okulfrapas la tradicieco de la revuo. Ĝi estas rondfamilia periodaĵo, germanaj esperantistoj kaj iliaj faroj por la movado interesas la redaktoron. Speciale kiam tiuj germanaj esperantistoj kolektiĝas en iu Esperanto-aranĝo. En ESPERANTO aktuell 4/97 estis raporto pri unu de tiaj aranĝoj, la Eŭropa Esperanto-kongreso en Stuttgart. Ĝi specialiĝis al la demando pri la rolo de Esperanto en la Eŭropa Unio. Kiel la lasta parto de la revunomo malkaŝas, oni volas raporti pri aktualaĵoj. Sed aktualaĵoj ne tro abundas en tiel malvasta komunumo kiel esperantoparolantoj, kaj tial en ESPERANTO aktuell estas la samaj novaĵoj kiel ekzemple en Esperantolehti kaj Eventoj. Krom recenzoj, tie ne multas eternaj, klerigaj artikoloj. ESPERANTO aktuell aperas ok fojojn jare, kvar numeroj estas german- kaj kvar esperantlingvaj. En la ESPERANTO aktuell 4/97 la responsa redaktoro Dirk Kretschmann esprimas sian volon lasi sian laboron sur ŝultroj de iu nova persono. La responsa redaktoro de ESPERANTO aktuell devas ankaŭ fari ties engaĝigon.

AR

Muut lehdet

Kansan Uutisissa oli tiistaina 29. heinäkuuta Osmo Bullerin haastattelu otsikolla ”110-vuotias esperanto elää ja voi hyvin”. Haastattelun lukemalla saattoi tunkeutua UEA:n keskustojen arkipäivään. Samalla haastattelun sekaan oli ujutettu perustietoa esperantosta. Haastattelun lopussa Osmo Buller toteaa: ”Verovälitys piti tosin vielä tehdä hollanniksi: Mutta esimerkiksi virkatodistuksen Rotterdamissa saa jo esperantoksi tekstitetynä.”

Keskisuomalaisessa oli lauantaina 28. kesäkuuta Pulssi-sivulla Norma Perälän haastattelu ”Esperanto käy seikkailusta”. Norma Perälä kertoi esperanton hyödyistä oleskeltuaan pitempiä aikoja Virossa, Italiassa ja Sveitsissä. Samalla haastattelu toimi perustietojen antamisesta kiinnostuneille., mm. BBC:n tuottama ”Mazi” mainitaan. Norma toteaa haastattelunsa lopuksi: ”Tätä kieltä puhuessa ei haittaa vaikka keskustelukumppani osaisi esperantoa huonommin, esperantoa puhuessa ei tunne häpeää.”

Jumalanpalvelus pidettiin esperantoksi

Esperantonkielinen jumalanpalvelus pidettiin 27.7. Sompalan kurssikeskuksessa Vesannolla. Liturgia ja saarna Matti Pesonen, kanttorina Marjaana Hukka. Sanankuulijoita oli yhteensä 35.

Kimmo Hakala

Finna lamento

*Komencanta tradukisto
– karaktere optimisto –
sentis ene strangan emon
prilabori ŝatpomon,
metis plumon inkovazen,
diris: Ek! Nun tuj Parnasen!*

*Poezio art' komplika
estas por novic' laika.
Eĉ post zorga analizo
ne sukcesis tradukskizo.
Pro sekvantaj fenomenoj
ektroviĝis grandproblemoj:*

*Laŭ la finna lingvosento
ĉiam kuŝas ĉefakcento
sur silabo la unua.
Poste estas ĉiu dua
akcentita malpli forte
senescepte, ĉiuvorte.*

*Tute mankas artikolo.
Estas fremda ĝia rolo.
Ĉu ĝin uzi aŭ forlasi?
povas nin nur embarasi
Estas tasko pena, ŝvita
lasi ĝin neakcentita.*

*Plia diferenca trajto
– ĉu pro praa egalrajto:
En la finna vortamplekso
ofte ne videblas sekso.
Kiun formon ni bezonu?
Viran? Inan? Mem rezonu!*

*Per silabo ununura
povas montri verbo plura
tempon, agon kaj aganton.
Sed trifojte tiun kvanton*

*– aŭ eĉ pli – traduk' postulis.
La faranto rekalkulis...*

*Ĉu dependas de kulturo,
ke ekzistas ne futuro.
Por esprimi estontaĵon
uzas ni duonan frazon.
Tamen iĝis la linio
tro mallonga nun pro tio.*

*Novaj trafis lin defioj
pere de prepozicioj.
Rare havas ni tiaĵojn,
ĉar ni uzas dekkvar kazojn.
Ĉu 'el' aŭ 'de', ĉu 'por' aŭ 'pro'?
kaŭzis da eraroj tro.*

*Elĉerpiĝis vorttrezoro
tamen ĝis malfrua horo
li sidadis pluskribante.
Ofte estis, mirigante,
la vespera flor' de l' cerbo
vekiĝinte nur fiherbo.*

*La poemo bela, fama
tradukate iĝis lama.
Kiom ajn li streĉe luktis,
nur strofaĉojn li produktis,
kaj strebado tre sincera
restis vana kaj despera.*

*Nepre sekvis do rezumo,
ke rezulto de l' cerbumo
pro kapablo manka, febla
devas resti nevidebla.
Ĝi estigus nur proteston:
Metu tion en tirkeston!*

– ak –

Kiaj ni?

Multe da diskuto aperis lastatempe pri tio, kiaj esperantistoj estas, ekzemple pri tio, ĉu Esperanto-komunumo havas unuecan idearon aŭ plurajn tre diversajn.

Unu ideo simila estas, sur kiuj paĝoj la esperantistoj aperu en gazetoj. Raŭmismoj eble volus, ke ni aperu ĉe kulturo, movadaj esperantistoj volonte troviĝus inter politiko kaj enlandaj novaĵoj, multaj eble sentas sin plej konvene ĉe hobiaj. Sed la malica ĵurnalisto lokigas nin ĉiujn sub “strangaĵoj”.



Premion pri ekstrema kritikemo gajnas ĉi-foje Bernard Golden el Hungario. Li kritikis en revuo Esperanto (julio-aŭgusto 1997) “propagandajn mispaŝojn surstrate”, inter kiuj estas ekzemple tio, ke la varon ne prezentas “pimpaj junulinoj, portantaj minijupon, kun alloga hararanĝo kaj delikate ŝminkita vizaĝo, sur kiu ĉiam radias tre simpatia rideto”.

Lia kritiko trafis eĉ finnojn. Nome, la atenton de Golden kaptis Ago-taga aranĝo de Esperanto-Societo en Turku kun kvar diverse kostumitaj virinoj, kiuj staris sub afiŝo kun teksto “100 jaroj da Esperanto-teatro”. Laŭ Golden: “Kvankamiliaj vestoj aludis al teatraj verkoj, ili tute ne aktoraj, eĉ ne per simpla skeĉo. La publiko, do, spertis nur tedan ekspozicion de malnovaj virinaj modoj.”

Bone Bernard, bone. Ankaŭ mi volonte vidus pli da viglo kaj ĉarmo apud la faktoj, kiam homoj prezentas Esperanton. Sed konsilu al mi kaj al la kompatindaj turku-anoj, kion fari, se inter niaj rondoj ne troviĝas amase da pimpaj junulinoj.

Ĉu trompi kaj dungi aron da junulinoj, kiuj papagas la lernitajn sloganojn pri la boneco, ktp. de Esperanto aŭ ĉu diri la veron kaj prezenti nin tiaj kiaj ni estas?



Unu tipo da esperantistoj, kiu ne apartenas al la favoratoj de s-ano Z. estas “martiroj”. Ili fieras pro tio, ke ili ne gajnis monon per Esperanto, aŭ ke ili uzis tiom kaj tiom da propra mono por ĝi. Prefereinde indus fieri pro tio, ke oni ricevas pagon kaj gajnas monon per Esperanto.



La malnovaj amikoj de s-ano Z., la latinistoj, havis sian kongreson en Jyväskylä. Interese, kaj gratulinde. Tamen la laŭdojn ne ricevos la interreta paĝo de la kongreso. Tie la titolo de la kongreso estis en la latina, sed ĉiuj tekstoj nur en la angla. Ŝajne la moderna latinisto bezonas la anglan por komuniki, same kiel la unuaj kongresoj de volapukistoj okazis en la germana. Espereble la sorto de la moderna latino ne estos la sorto de volapük.

Tamen estis kortuŝe vidi, ke la latinistoj argumentas por sia kongreso per frazo tre konata, sed por Esperanto ne plu aparte aktuala: Ke eblas komuniki per la lingvo!



Finnlanda societo de vivantaj poetoj ricevis amasan popularecon tuj post sia fondiĝo antaŭ kelkaj jaroj. Ĉu simila ekzemplo revivigus ankaŭ esperantistojn: Ĉu necesus fondi societon de vivantaj esperantistoj aŭ de esperanta poezio....

S-ano Z.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Pengerkatu 18 A 86, 00500 Helsinki

Miniatūra Universala Kongreso en Valencio

La regionaj gazetoj, radio- kaj televidstacioj de Valencio (Hispanio) vaste reliefigis la abundajn artajn kaj kulturajn programojn de la 7-a Internacia Esperanto-Kongreso, kiu tie okazis komence de julio. En tiuj programoj ludis preskaŭ cent geartistoj de 6 trupoj el Pollando, Rumanio kaj Hispanio: grandan sukceson atingis la 40-membra kant-ensemblo de la pedagogia altlernejo de Bydgoszcz (Pollando), la samnombra infana folkloro dancgrupo "Plomienie" kaj la folkloro trupo de la Aragona Centro, kiu entuziasmigis la ĉeestantojn per siaj vervoplenaj ĵotoj. Ne mankis elektronika muziko en originala plenumo de Eduardo Vargas "Solo" (Hispanio), socikritikaj verskantoj de Michael Bronstein (Sovetunio) kaj muzik-prelego de Heras, (Hispanio).

La kulturaj prelegoj kunigis temojn pri juro (Urna, Hispanio), botaniko (Zvara, Slovakio), informatiko (Sancho, Hispanio), literaturo (Gutierrez, Kubo; Fernandez, Hispanio), terapio (Staisiunaite, Li-

tovio), lingvistiko (Alonso, Hispanio), radio Pietrzak, Pollando) kaj lingvo-politiko (Figiera, Italio).

La supra listo de la aranĝoj ne estus kompleta se ni ne citus la publikan Csemetodan kurson de Zacharias (Slovakio) kaj la prezentadon de la novaj verkoj de la hispan-portugala literatura grupo "Ibere libere" (Fernandez, Camacho, Neves, Dek). La kongreso omaĝis en aparta kunveno la forpasintojn Ada Figiera-Sikorska kaj Juan Carlos Ruiz. Rimarkinde, ke la kongresanoj partoprenis en manifestacio por peti la liberigon de la forrabita skabeno Blanco Garrido, poste murdita de la teroristoj.

Pli ol 500 kongresanoj el 16 landoj partoprenis en la kongreso, kiu samtempe estis la 56-a Hispana E-kongreso: la prezidanto de LKK, Augusto Casquero, jam organizis tri sukcesajn E-kongresojn: du naciajn en Madrido kaj Valencio kaj unu universalan en la laste citita urbo.

(GCF)

Seuraava numero ♦ Venonta Numero

Seuraava numero ilmestyy lokakuussa. Jutut 30.9. mennessä Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos en oktobro. Sendu la artikolojn ĝis la 30-a de septembro al Aimo Rantanen, PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.